

# VERD

Januaro 2011 **6**  
N-ro **6**

# TRIANGULO

bulteno por Esperanto-amikoj en Bretonio, Saksio kaj Silezio  
kazinenn mignoned an esperanteg e Breizh, Saks ha Silezia (br)  
bulletin pour les amis de l'espéranto de Bretagne, de Saxe et de Silésie (fr)  
Bulletin für Esperanto-Freunde in der Bretagne, Sachsen und Schlesien (de)  
bulletin za přecelov esperanta w Bretanii, Sakskej a Šleskej (sb)  
biuletyn dla przyjaciół esperanta w Bretonii, Saksonii i na Śląsku (pl)

## Enkonduko



FOTO: Urbodomo en Wrocław (S.Klimek)

Antaŭ unu jaro vi tenis en la mano la 5-an numeron de „bulteno komuna al Esperanto-amikoj en Saksio kaj Bretonio”, kiun nia poeto Baldur Ragnarsson el Islando nomis “vere interesa legaĵo, informa kaj bonstila” (06.01.2010). La 17-an de januaro 2010 Teresa Pomorska kiel nuna prezidantino de Silezia Esperanto-Asocio - el Wrocław, la pollanda ĝemel-urbo de Dresden - retmesaĝe demandis Beniton (Benoît Philippe) el Dresden, la nunan prezidanton de Saksa Esperanto-Asocio, pri eblecoj de kunlaboro. Ŝi interalie skribis, „ke bone estus, se via plej najbara Esperanta asocio kunligiĝus al tiu laboro [por la ĉi-supre menciita bulteno] kaj se ni kreus triangulon”. Mi volas ŝpari al vi rakontadon de ĉiaj postaj detaloj... La demando de Teresa estis jam decida por nia “trianguliĝo” kaj por la nomŝanĝo de nia bulteno VERDAJ SAKSOFONO KAJ TRISKELO al VERDA TRIANGULO, kiu ekde nun aperos ĉiujare ne nur plu en Bretonio kaj Saksio sed ankaŭ en Silezio, do sume en lingve kelta-latinida, ĝermanida kaj slava regionoj de Eŭropo.

**Per nia komuna Esperanta laboro ni volas helpi al eterna idealo de Eŭropa kontinento libera de lingva kaj kultura diskriminacio kaj privilegio.**

Oni ricevas jenan bultenon en Bretonio ĉe Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné ([bert.schumann@gmail.com](mailto:bert.schumann@gmail.com)) en Saksio ĉe Benoît Philippe, Pillnitzer Landstraße 25, DE-01326 Dresden ([abu-sina@arcor.de](mailto:abu-sina@arcor.de))

en Silezio ĉe Teresa Pomorska ([pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl))

Plej prosperan jaron 2011 deziras al vi Teresa Pomorska, Bert Schumann, Benoît Philippe kaj Steffen Eitner!

**Redaktofino por VERDA TRIANGULO N-ro 7: 20.11.2011**

**Redakcio: Saksa Esperanto-Biblioteko,  
Pillnitzer Landstraße 25, DE-01326 Dresden**

## Vroclavo kaj Esperanto

Vroclavo (pole *Wrocław* – elparolu vrocuaŭ, germane *Breslau*, ĉeĥe *Vratislav*) estas laŭ la grandeco la kvara urbo en Pollando kaj la plej granda urbo en ties okcidenta parto. Vivas tie pli ol 630 000 homoj. Disvastiĝante ĉe la bordoj de la rivero Odro kaj de ties kvar alfluantoj, ĝi fariĝis unike bela urbo kun siaj 12 insuloj kaj 112 pontoj.

Ekde la fino de la Dua Mondmilito ĝi estas la ĉefurbo de la vojevodio Malsupra Silezio kaj ties regiona ekonomia kaj kultura centro.

Nun Vroclavo estas urbo de toleremo kaj de multaj religioj: katolika, protestanta, ortodoksa kaj judisma. Multkultura, favora al novaj ideoj kaj defioj, ĝi famas pro sia gastamo kaj ĝia kultura kaj scienca vivo ĉiam fascinas kaj allogas.

Ekzistas multaj signoj de Esperanto sur la teritorio de Malsupra Silezio. Ludoviko Zamenhof mem kelkfoje haltis en sileziaj kuraĉlokoj, en *Bad Reinerz* (pole *Duszniki Zdrój*) en la jaroj 1906 - 1909 kaj en *Bad Salzbrunn* (pole

*Szczawno Zdrój*) en la jaro 1912, por plifortigi sian sanon. Cezuraj datoj por la silezia Esperantomovado estas la Unua kaj la Dua Mondmilitoj, la fino de stalinismo post la jaro 1953 kaj politikaj ŝanĝoj post la jaro 1989.

La unua konata esperantisto en Malsupra Silezio estas *Curt Walther*, poŝtoficisto en *Hirschberg* (pole *Jelenia Góra*), kiu esperantistiĝas en 1897. Probable li frue forlasas Silezion, ĉar mankas pliaj informoj pri lia silezia agado.

Post kelkaj jaroj lernas Esperanton, aŭ venas en Silezion de alia loko, *Rudolf Janas*, kiu entuziasmigas 9 aliajn personojn kaj la 12-an de aprilo 1905 fondas esperantistan grupeton en *Breslau* (pole *Wrocław*) kaj fariĝas ĝia unua prezidanto. Ne ĉiuj daŭrigas la lernadon, sed jen post unu jaro venas Vroclavon komercisto *Karl Wallon*, naskiĝinta en *Pleß* (pole *Pszczyna*) en Supra Silezio, kiu revivigas la grupon. Prezidanto fariĝas d-ro *Geldner*, *Karl Wallon* estas vicprezidanto kaj *Rudolf Janas* sekretario kaj kasisto.



**FOTO: Psikoanalizisto**

Speciale granda estas intereso pri Esperanto inter komercistoj. La komercaj ĉambroj en *Görlitz* (pole *Zgorzelec*), *Liegnitz* (pole *Legnica*) kaj *Schweidnitz* (pole *Świdnica*) tre subtenas Esperanton. Oni devas substreki tre energian agadon de *Arnold Behrendt* el *Breslau*, d-ro *L. Huebner* el *Schweidnitz* kaj *Ferdinand Mally* el *Görlitz*, kiu fondas 11 Esperanto-grupojn.

Dimanĉe la 22-an de aŭgusto 1909 esperantistoj el *Breslau*, *Gleiwitz* kaj *Schweidnitz* ekskursas al la kuraĉloko *Bad Reinerz* por renkontiĝi kun Ludoviko Zamenhof kaj lia familio, kiu ripozas tie antaŭ sia vojaĝo al la 5-a Universala Kongreso en Barcelono.

La esperantistaro de Vroclavo tre energie engaĝiĝas en popularigadon de okazontaj en 1913 kulturhistoria kaj ĝardena ekspozicioj kaj de la inaŭguro de la avangarda konstruaĵo *Jarcenta Halo*. Kun subteno de la Vroclava urbokomunumo, oni eldonas esperanto-lingvajn prospektojn pri la urbo kaj pri la ekspozicio kaj ankaŭ 24-paĝan gvidlibron pri Vroclavo. La eldonon de la gvidlibro prizorgas *Arnold Behrendt*. La magistrato de Vroclavo aliĝas al UEA por havigi al si materialon el eksterlando por la ekspozicio kaj propagandi ĉi tiun per Esperanto en aliaj landoj. La 10-an de aŭgusto 1913 okazas „Breslaŭa Esperanto-Tago” kun interesa tuttaga programo.

Kiam la Unua Mondmilito finiĝas kaj fondiĝas aŭ refondiĝas multaj novaj ŝtatoj en Eŭropo, orienta parto de Prusia Silezio transiras en 1921 al renaskiĝinta Pollando. Aŭstria Silezio estas dividita inter Pollando kaj nove fondita ŝtato Ĉeĥoslovakio. En ĉiuj partoj de Silezio, apartenantaj nun al tri ŝtatoj, esperantistoj entuziasme eklaboras.

En Vroclavo plej aktive laboras *Max Mielert*, kiu instruas Esperanton en la katolika gimnazio de Sankta Mateo kaj estas prezidanto de Katolika Esperanto-Grupo „Unueco“. En la Mateo-gimnazio lernas Esperanton 90 lernantoj, kiuj fondas Esperanto-Rondon „Amikaro“. Laŭ iniciato de *Max Mielert* la 4-an de oktobro 1919 oni fondas en Vroclavo Ligon de Katolikaj Esperantistoj en Germanujo.

Fondiĝas Silezia Esperanto-Ligo kun lokaj grupoj en tuta germana Silezio kaj sidejo en Vroclavo. Dum la tagoj 3-6 de junio 1922 okazas en Vroclavo la 11-a Germana Esperanto-Kongreso kun pli ol 500 partoprenantoj. Danke al klopodoj de pastro *Eduard Becker*, la 16-an de junio 1924 Radiostacio Breslau komencas regulajn ĉiusemajnajn 10-minutajn disaŭdigojn, kiuj estos ĉesigitaj de nazioj en la jaro 1933.

Antaŭ la 23-a Universala Kongreso en Krakovo, la 30 kaj 31-an de julio 1931 en Vroclavo okazas la Antaŭkongreso kun partoprenantoj el 10 landoj, alloga programo kun subteno de urbaj aŭtoritatoj.

Antaŭ la Olimpiaj Ludoj okazantaj en 1936 en Berlino, estro de la Sekreta Ŝtata Polico Gestapo dekretas, ke antaŭ la 15-a de julio 1936 ĉiu grupiĝo esperantista devas

ĉesigi sian agadon. La esperantistaro en la germana parto de Silezio ne plu povas aktivi.

La Zamenhofan memorigan ŝtonon el *Bad Reinerz* (pole *Duszniki Zdrój*) oni kaŝas en profundan arbaron.

En ĉeĥa Silezio la movado disvolviĝas komence ĉefe inter la germana loĝantaro, sed fondiĝas ankaŭ ĉeĥaj kaj polaj Esperanto-grupoj. *Ludwik Krysta* fondas en 1931 Regionan Esperanto-Ligon, en kiu amike kunlaboras esperantistoj de tri naciecoj: ĉeĥoj, germanoj kaj poloj.

La 8-an de majo 1927 okazas unua esperantista renkontiĝo sur la montosupro Ĉantorio en la sileziaj Beskidoj aranĝita de ĉeĥaj esperantistoj. Partoprenas ĝin 111 personoj: ĉeĥoj, germanoj, hungaroj, poloj kaj slovakoj. Kunvenon gvidas *Ludwik Krysta*. Ekde tiam esperantistoj renkontiĝadas ĉiujare ĝis 1938.

Post la Dua Mondmilito oni renovigas la tradicion en 1948, sed dum la stalinisma periodo senperaj interparoloj inter poloj kaj ĉeĥoj sur Ĉantorio ne estas eblaj.

En Supra Silezio, tuj kiam finiĝis la kruela milito, rekomencas agadon *Emil Kołodziej*, *Franciszek Mikunda* kaj *Jan Tichawski*. En ĉeĥa Silezio ree aktiviĝas: *Stanislav Chaloupka*, *Josef Dvořáček*, *Antonin Glet*, *Josef Hanzelka*, *Alfons Kermel*, *Alois Kubala*, *Jan Taraba*, *Vladimír Slaný* kaj multaj, multaj aliaj. En senesperantigitan Malsupran Silezion venas kelkaj esperantistoj el aliaj regionoj (*Janina Ender*, *Jakub Garbar*, *Eugeniusz Matkowski*, *Eugeniusz Misiurewicz*, *Józef Popiolek*, *Roman*

*Sakowicz* kaj *Marian Tyszkiewicz*), por konforme al vortoj de la elstara franca esperantisto *Théophile Cart* (1855-1931) fosi la sulkon kaj semi esperon.

Antaŭ ol Zamenhof publikigis sian unuan lernolibron, en la Vroclava Universitato (iama „*Viadrina*“ translokigita en la jaro 1811 de Frankfurto ĉe Odro) studis granda pola esperantisto *Antoni Grabowski* (1880-1884). Li kompreneble esperantiĝis jam ekster Silezio, sed eble la etoso de la Vroclava Universitato, kie studis diversnaciaj studentoj, kaŭzis lian interesiĝon pri la problemo de internacia lingvo.

Ĉe la Vroclava strato *Kuźniczka* en la « Domo de du poloj » li estis honorita per memoriga tabulo kun

### Sileziaj esperantistoj nun

Pri la historio de la Esperanto-movado en Vroclavo vi jam scias vaste de la supra artikolo.

Mi supozas, ke multaj el vi, kiuj je la unua fojo legas VERDAN TRIANGULON, volus scii, kio nun okazas en Vroclavo kaj en Silezio.

La nuna tempo estas konvena por resumoj, ĉar ni proksimiĝas rapide al la fino de la jaro.

Krome en tiuj semajnoj finiĝis la unua jaro de laboro de novelektita estraro de Silezia Esperanto-Asocio.

Kion ni atingis dum ĉi tiu jaro? Kio okazis ?

Ni strebis, ke nia Vroclava sidejo ĉe la *Dubois*-strato 3 vivu.

Ni provis inviti homojn al divers-specaj aranĝoj, ne nur esperantistaj.

Post silvestra balo, ni kolektis homojn, kiuj ŝatas danci kaj dum la tuta karnavalo ni gaje pasigis tempon, preskaŭ ĉiusemajne parto-prenante dancvesperojn.

Novaj personoj, kiuj je la unua fojo en sia vivo renkontiĝis kun bonkoraj, sinceraj homoj, kiuj ne parolis pri politiko kaj mono, estis vere ravitaj per la etoso tie reganta.

surskribo en la pola lingvo, kiu tekstas jene:

ANTONI GRABOWSKI . Elstara kemiisto-kolorigisto de teksaĵoj, kunkreinto de pola kemia terminaro, fondinto de Pola Esperanto-Asocio, nomita patro de Esperanto-poezio , tradukinto de « Sinjoro Tadeo »

Por honori unuajn postmilitajn Vroclavajn esperantistojn oni fiksis ĉe la Urboplaco sur muro de brikdomo memorigan tabulon kun jena teksto:

En tiu ĉi brikdomo la 18-an de marto 1948 formiĝis la unua postmilita pola Esperantista organizacio. Fondis ĝin: ( sekvas la nomoj de la fondintoj )

kompilita de Andrzej Kraszewski surbaze de materialo verkita de Edward Wojtakowski (Wrocław – Silezio)

Ili komencis venadi ankaŭ por komune kanti karaokojn, spekti lumbildojn kaj... lerni Esperanton. Krome ili ĉiam aŭdis, ke la Esperanta medio estas interesa, gastama kaj diversnacia.



FOTO: Marek kun Elżbieta kaj Anna en Szczawno

Ili eksentis, ke ili trovas tie ĉi amikojn, se ankaŭ ili ekkonos la lingvon, per kiu oni povas interkompreni kun aliaj esperantistoj.

La unuaj Esperanto-aranĝoj: FREŜO en *Olsztyn*, GES en *Wągrowiec* konfirmis tiun senton – « Esperanta medio vere plaĉas al ni, indas paroli Esperanton ».

Kulmino de someraj Esperanto-esploroj estis la 43-a Internacia Esperanto-Feriado en *Szczawno* (samtempe la 1-a Filma Esperanto-Feriado), dum kiu ĉefa vespera programero estis spektado de filmoj de *Roman Dobrzyński* kun ĉarmaj rakontoj de ilia aŭtoro.

Dum tagoj ni diligente lernis kaj agrable ripozis en montaro

kaj belega kuraĉloko. Tri spertaj instruistoj – *Jerzy Wałaszek* el *Sosnowiec*, *Stanisław Śmigielski* el *Kędzierzyn-Koźle* kaj *Roman Dobrzyński* provis efektive enhavigi en kapojn Esperantan konscion.

Post lecionoj kaj bongusta tagmanĝo ni tre volonte migris tra la ĉarmega regiono de *Szczawno Zdrój* – buse, piede, promenante kaj kelkfoje grimpante – ekzemple en la ĉeĥa montaro *Broumvske Steny*.

Danke al ĉeesto de du muzikistoj gitaristo *Marek* kaj pianisto *Mietek* ni preskaŭ ĉiuvespere kantis belegajn Esperantajn kanzonojn.

Dum la adiaŭa vespero, kiam ni metis florojn omaĝe al Ludoviko Zamenhof ĉe memoriga ŝtono

dediĉita al li en *Szwedzki Park* (Sveda Parko), okazis vera publika koncerto.

Inter la membroj de Silezia Esperanto-Asocio troviĝas artistoj, do dum diversaj aranĝoj ni havas eblecon aŭskulti belegan muzikon – interalie okazis belega koncerto dum la finiĝo de la studjaro la 28-an de junio 2010 kiam prezentis sin al ni ĉarma familia teamo: patrino *Alina Orlicka* kaj filino *Milena*, belege improvizanta flute.

Pri aliaj aranĝoj vi povas iomete legi kaj kompreneble vidi fotojn sur jena retpaĝo:

<http://www.ipernity.com/doc/silezia.esperanto/album>

Kompreneble ni ne povas ne memori pri niaj du unuaj tut-tagaj kunvenoj de sileziaj kaj saksaj

esperantistoj en Gorlico (*Görlitz-Zgorzelec*) la 24-an de aprilo kaj la 11-an de decembro 2010. Dum la unuan partoprenis 18 Esperanto-amikoj, la duan partoprenis jam 25 (el *Wrocław, Oława, Bydgoszcz, Dresden, Pirna, Radebeul, Neustadt* kaj *Münster*). Okazis tie ĉiĉeronadoj tra la germana urboparto kaj tra la Silezia Muzeo, lukulaj tagmanĝoj kun por Benoît neforgesebla supo *zurek* en la pola urboparto kaj Esperanto-kursoj en kunvenejo de adventistoj.

Mi havas grandan esperon, ke nia tria Gorlica kunveno denove ĝojigos tiujn, kiuj en ĝi partoprenos, kaj donos pli fortan motivon por plua lernado kaj interpersonaj kontaktoj.

Teresa Pomorska – prezidantino de Silezia Esperanto-Asocio (Wrocław – Silezio)

## Aforismoj de la latina poeto Horatius Flaccus (65-8 a.K.)

en Esperanto-traduko de Dirk Bindmann (Zeititz – Saksio-Anhalto)

(el la deklingva „Horaz-Lateinkalender 2011“ eldonita de

*Internatsgymnasium Pädagogium* en Bad Sachsa, [www.internats-gymnasium.de](http://www.internats-gymnasium.de),

retadreso: [kontakt@internats-gymnasium.de](mailto:kontakt@internats-gymnasium.de))

- ☀ Mezuro enestas la aferojn; ekzistas certaj limoj, trans kiuj, ĉu tie aŭ tie, mankas ia pravo. (Sermones I. 1,106)
- ☀ Ne eterne floras printempo, ne ĉiam la luno ruĝas: Do kial vi ŝarĝas vian animon per planoj por la eterne? (Carmina II. 11,9ff)
- ☀ Bone vivas la modera, kiu de patro heredis salpoton sur simpla tablo, nek timo ĝenas lian dormon nek malpura avido. (Carmina II. 16,13ff)
- ☀ Gaje ĝuu la nuntempon kaj lasu la zorgon por morgaŭ. La amaran eltenu kun serena rideto. Plena feliĉo ekzistas nenie. (Carmina II. 16,25ff)
- ☀ Forto sen saĝo faligas sin per propra impeto, forton prudentan la dioj eĉ plifortigas. (Carmina III. 4,65ff)
- ☀ Multo mankas al tiu, kiu deziras multon; benita estas tiu, al kiu sufiĉan donis dio per avara mano. (Carmina III. 16,42ff)

Kiel oni ĝenerale scias en la mondo (se ne en la tuta mondo - en Pollando tutcerte) - Vroclavo estas urbo de koboldoj. Kial? Ĉar oni komisiis al mi skribi pri koboldoj ĉion, sed koncize - mi do ekzistantan jam pli frue koncizan tekston ankoraŭ pli koncizigis.

Dum la komunisma periodo koloro kiu kovris ĉiujn aliajn kolorojn estis la ruĝa (kaj la griza - kiu estis la ĝenerala koloro de tio kio ne estis ruĝa). Proksimume en la jaro 1980 (proksimume mi diras - do ne tute precize) kelkaj uloj elpensis ke blankajn makulojn kiuj restis kiam la milico surpentris kontraŭreĝimajn sloganojn oni povas iel ornamati. Tie kaj tie ĉi sur la blanka makulo aperis mallerte pentrita koboldo. Oni foje diras ke se oni ne scias kiu ion faris - ĝin faris koboldo. Poste la samaj uloj mem volis esti koboldoj kaj faris kaj surmetis koboldajn ĉapojn - oranĝkolorajn. Ili nomis sin „Oranĝkolora Alternativo” - kontraŭe al la oficiala ruĝo. Dum la 1980-aj jaroj ili pli kaj pli agadis, multfoje organizadis okazaĵojn kun porreĝimaj nomoj - ekzemple Tago de Milicano, Tago de Virinoj, Oktobra Revolucio, Kiu timas necesejan paperon? (oni devas mencii ke en tiu periodo aĉeti necesejan paperon estis preskaŭ neatingebla feliĉo). La milico arestadis la partoprenantojn, sed - se da partoprenantoj estis kelkmil kaj ĉiu havis koboldan oranĝkoloran ĉapon... kiun aresti, kiun ne aresti?

En la jaro 2001 ĉe la strato Świdnicka, jam post la forpaso de komunismo, apud la horloĝo kiu estis renkontiĝa punkto de koboldaj aranĝoj oni inaŭguris monumenton

de la unua koboldo - Paĉjo (*Papa Krasnal*). Aliaj, veraj koboldoj tamen ankoraŭ dum kelkaj jaroj kaŝis sin en sia subterejo. Nur en la jaro 2005 aperis unuaj kvin - la plej kuraĝaj. Kaj tiam komenciĝis! Vroclavanoj ege ekamis la unuajn kaj ĉie serĉis novajn. Kaj novaj eliradis kaj eliradis el la subterejo. La elirejo troviĝas apud la dometo Jaś (Joĉjo) - sur la placeto apud la baziliko de Sankta Elizabeto. Ĝin gardas koboldo Gardisto. Koboldoj estas ĝenerale tre decaj estaĵoj. Ili malŝatas krimulojn (unu sidas kun katenoj surkrure en la fenestro de mezepoka malliberejo ĉe la strato Więzienna (Mallibereja). Kelkaj ŝatas bone manĝi, kelkaj estas sciencistoj (Bibliofilo, Psikanaliziŝto), estas metiistoj, komercistoj, klaŭnoj, turistoj... Ĉiujn mi jam ne scipovas nombri. Oni diras ke da ili estas jen 109, jen 130. Kelkajn oni ŝtelis, kelkaj alilokiĝis. Mi mem fotis eble 80, sed vere mi ne kalkulis. Multaj koboldoj trovis lokon en lernejoj, hospitaloj, vendejoj. Unu senĉese veturas per tramo, alia loĝas sur porturista ŝipeto.

Post kelkaj ŝteloj la koboldoj pli firme alkroĉiĝas al la grundo, kelkaj havas interne GPS-aparaton por facile trovi lin se li ekhavas ideon ien formigri. Mi estas preta disponigi kelkajn fotojn de la koboldoj esperante ke - se iu intencas studi pli profunde koboldologion - tiu pristudu mapon de dislokigo de koboldoj kiun oni povas aĉeti en porturistaj butikoj. Oni ankaŭ trarigardu mian paĝon en la retejo "Ipernity" (mia kaŝnomo: Toeko) - tie oni trovos pli ampleksan artikolon rilatantan al la koboldoj kaj ankaŭ mian fotoalbumon kun Vroclavaj koboldoj.



**FOTO: Gitarludisto**

Kaj plej bone - venu al Vroclavo, kaj se Vi estas Vroclavano - prenu la mapon, kunprenu iun kiu jam la koboldojn konas kaj - ek tra la stratetoj de Malnovurbo kaj de aliaj urbopartoj!

Teodor Konopka (Wrocław - Silezio)

## La kvieteco

La kvieteco  
de arbaro  
aperis al mi  
sur eta voj’.

Subite – mallaŭte  
iras iu miaflanke.  
„Kiu vi estas kaj de kie vi venas?”  
mi demandas surprizite.

„Mi estas la kvieteco”  
ŝi diras ridetante.  
„Venas el alia lando,  
tre for de via lando.”

„Kaj kien vi volas iri?”  
mi demandas mallaŭte.  
„Mi volas iri al vi aŭ  
se plaĉas al vi plie  
mi deziras iri al vi.”

„Kaj kial nepre al mi?”  
„Tion mi povas malkaŝi”  
ŝi respondas serene.  
„Vi loĝas en laŭta lando,  
la homoj krias laŭte,  
la maŝinoj krias laŭte,  
eĉ bildoj krias laŭte.”

„Vi pravas – okazas tiel”  
mi respondas mallaŭte.  
„Nu vidu – tial mi venas  
al vi.” Iom da tempo  
kvietas inter ni ambaŭ.  
Kunsento kortuŝas min.

„Multaj homoj sentas tiel,  
suferas pro bruego,  
ne plu sin interkomprenas.  
Ĉu vi venemas al mi?”  
mi demandas heziteme.  
„Kiel okazos tio?  
Ĉu vi vere venos en min?”

„Ne eblas” ŝi respondas.  
„Mi estas tro granda por vi.”  
„Do – ĉio estas vana”  
mi diras iom malĝoje.  
„Nenio estas vana  
ĉar mi malfermas min por vi.”

Korpo, animo, spirito  
unuiĝas en varma  
ŝirmo de la kvieteco.

Albert Jäger (Pirna – Saksio)

## Matenmanĝo

Li verŝis la kafon  
En la tason  
Li verŝis la lakton  
En la tason da kafo  
Li metis la sukeron  
En la laktokafon  
Per la kulereto  
Li kirlis  
Li trinkis la laktokafon  
Kaj li remetis la tason  
Sen vorto al mi  
Li ekbruligis  
Cigaredon  
Li blovis ringojn  
El la fumo  
Li deskuis la cindron  
En la cindrujon

Sen vorto al mi  
Sen okulo al mi  
Li ekstaris  
Li surmetis  
La ĉapelon sur la kapon  
Li surmetis  
La pluvmantelon  
Ĉar pluvis  
Kaj li foriris  
Sub la pluvon  
Sen ia vorto  
Sen okulo al mi  
Kaj mi kovris per la manoj  
Mian vizaĝon  
Kaj mi ekploris.

*Jacques Prévert (1900-1977)*

El la franca lingvo esperantigis Grzegorz Pisarski (Wrocław – Silezio)  
Originala titolo: *Déjeuner du matin (1945)*

*Jacques Prévert* estis franca poeto kaj scenaristo mense ligita kun la superrealismo kaj komunismo. Li vivis en *Saint-Paul-de-Vence* apud Nico en Provenco. Li estis la ununura populara franca poeto post la Dua Mondmilito. Lia verkaro konsistas el poemoj, kanzonoj kaj kinoscenaroj. Lia poezio ofte netradukeblas, ĉar plenplenas je vortludoj (signifoplenaj, kaj ofte geniaj). Pluraj el liaj poemoj iĝis popularaj kanzonoj.

## Familio malkovras Esperanton en la Golfo de Morbihan



FOTO: survoje por malkovri Esperanton

Jaŭdon la 5an de aŭgusto 2010, familio (patrino *Raymonde*, ŝia filo *Thierry*, ŝia nepo *Damien* kun sia amiko *Julien* kaj ŝia nepino *Camille*) malkovris Esperanton dum la dua promenado «Malkovro de Esperanto en Morbihana Golfo» ĉiujare organizita de la Esperanta Klubo de *Rhuys*.

Post rapida prezentado de la internacia lingvo kreita de Ludoviko Zamenhof en 1887 kaj de ĝiaj ĉefaj reguloj, ĉiuj enŝipiĝis en la haveno *Port-Navalo* je la deka. Ĉar la vetero estis belega kaj dolĉega, ĉiuj ĝuis la promenadon pasantan proksime de la terpintoj de *Le Monteno*, *Kerners* kaj *Le Logeo*.

Alvenintaj en *Peneraz*, la orienta doko de la insulo *Arz*, ĉiuj elŝipiĝis por pikniko sub pinoj kaj fronte al

la maro. Ni klarigis al niaj gastoj ke Esperanto malrapide daŭrigas sian disvolviĝadon tra la mondo danke al interreto kaj malgraŭ malhelpo de multaj aliaj kontraŭaj interesoj. Ĝia lernfacileco multe helpas la gelernantojn: ĉiuj esploroj pri tio elmontras kaj pruvas ke oni lernas Esperanton kvin aŭ sesfoje pli rapide ol ĉiujn aliajn lingvojn!... Kaj tiam, kia plezuro eltrovi originalajn trezorojn alvenantajn de etaj aŭ minoritataj lingvoj kiuj estas minacataj de la lingva premo de ekzemple la angla, franca aŭ germana...

Post pikniko ni ree enŝipiĝis kaj daŭrigis malkovron de la Golfo dum ankoraŭ bona vetero, tamen nun blovis pli maldolĉe ol dum tiu mateno: ni navigadis ĉirkaŭ la insulo

## VERDA TRIANGULO

Lern kaj laŭlonge de la insuloj *Boëdé* kaj *Boëdic*, ni transpasis ankaŭ la havenojn *Port Anna* kaj *Conleau* de kie ni okcidenten retroveturis preterpasante laŭlonge de *Arradon*, *Ile aux Moines*, *Berder*-insulo, Longa Insulo kaj finfine haltis ĉe *Port-Navalo*. La plej junaj el niaj vojaĝantoj ĝojis pro la vetero kaj ĉar ili sidis ĉe la pruo de la ŝipeto.

Je la dek-sepa, la elŝipiĝo okazis sen problemoj en *Port-Navalo* kaj ĉiuj montris sin tre kontentaj pro la tago malgraŭ kelkaj malfacilaj momentoj por la junulino *Camille*...

Ŝajnas ke la mesaĝo : «Esperanto kiel punta lingvo, justa lingvo» estis tute bone komprenita...

Francis Desmares  
(Sarzeau/Sarzhav - Bretonio)

## Aforismoj de la latina poeto Horatius Flaccus (65-8 a.K.)

- ☀ Naturon elpelu per forko, ĝi tamen revenas ade kaj ne rimarkite ĝi rompas la maskon pretendan. (*Epistula I. 10,24f*)
- ☀ Ĉiun feliĉan horon, kiun dio donacas, prenu per danka mano, ne prokrastu la ĝojon al onta jaro. (*Epistula I. 11,22f*)
- ☀ Ĉiu mezuru sin per mezurilo konvena por si, kaj tio estas la tuta vero. (*Epistula I. 7,98*)
- ☀ Foje miksu prudenton kun senzorgeco: dolĉas malŝparo en ĝusta tempo. (*Carmina IV. 12,27f*)
- ☀ Eĉ kiam la kosmo disfalas, la ruino trafas bravulon. (*Carmina III. 3,7f*)
- ☀ Konsterne! Sed per pacienco elteneblas ajna, kies forigon malebligas la dioj. (*Carmina I. 24,19f*)

## Projekto por tri ĝemel-urbetoj

Mi loĝas en la urbeto *Montfort-sur-Meu* (6000 loĝantoj), situanta je 25 km okcidente de *Rennes*, la ĉefurbo de Bretonio (Francio).

Tiu urbeto estas ĝemeligita ekde pli ol dudek jaroj kun *Marktheidenfeld* (en Malsupra Frankonio, Germanio) kaj ekde malmulte da tempo kun *Pobiedziska* (en Grandpollando, Pollando), kiu same estas ĝemeligita kun *Marktheidenfeld*.

En aŭgusto 2010, kadre de eŭropa programo "Juneco en agado", dek-ok junuloj el la tri urbetoj, 13-17-jaraj, estis volontuloj por pripensi akvoprotektadon. Ili pasigis unu semajnon kune en la kampadejo de Montfort, kaj laboris por purigi la bordojn de riveretoj ĉirkaŭ

Montfort. Ili ankaŭ vizitis lokojn de akvokaptado kaj turismajn lokojn. Ili ankaŭ kompreneble interŝanĝis pensojn kaj spertojn kun tieaj loĝantoj.

La celoj: vivigi kaj junularigi interŝanĝojn inter la tri urbetoj, kompari malsamajn vidpunktojn pri akvo, disvolvi eŭropan civitanecon, estis plene realigitaj.

Financis la programon Eŭropa Unio kaj en Bretonio la Regiona Konsilio kaj la urba konsilio de Montfort.

Sama renkontiĝo okazos dum somero 2011 en *Marktheidenfeld* kaj dum somero 2012 en *Pobiedziska*.

Josette Ducloyer (Montfort/  
Monforzh - Bretonio)

Danke al nia partopreno en la koruso Interkant', ni havis la feliĉon partopreni la 95-an kongreson de UEA en Kubo. En Kubo! Kia vojaĝo! Ĉar verŝajne tio eble ne reokazos dum nia vivo. Ni, *Marie-Pierre*, *Amapola* kaj *Laurent*, decidis daŭrigi nian restadon en Kubo post la kongreso, dum unu semajno.

Do post la memorinda koncerto de Interkant' kaj ekde la fino de la internacia kongreso, la 24-an de julio, ni forlasis niajn kantgeamikojn en la hotelo *Acuario*: ni ne povis partopreni la malinaŭguron de la kongreso.

Fakte ni devis deponi parton de niaj pakaĵoj en domo de la gastigantino de nia lasta punkto en Havano kaj veturi aŭtobuse al la urbo *Trinidad*, nia unua etapo.

En tiu aŭtobuso vojaĝis nur eksterlandanoj: ĉar en Kubo ekzistas interurbaj aŭtobusoj destinitaj por eksterlandanoj kaj aliaj por kubanoj. En ĝi ni renkontis plurajn esperantistojn interalie germanon Ulf, kiun ni ree renkontos en *Trinidad* kaj *Cienfuegos*.

### **Trinidad, iama kolonia urbo**

Kiam ni alvenis en *Trinidad*, ekster la aŭtobusstacidomo, atendis pluraj personoj insiste proponantaj gastigadon. En Kubo eblas tranokti en hotelo aŭ ĉe loĝantoj ŝtate rajtigitaj gastigi turistojn: ĉiukaze la prezojn difinas la ŝtato. La rajtigitaj gastigantoj devas pagi al la ŝtato altan imposton kiu ajn estas la nombro de gastoj: pro tio la gastigantoj diligentas por trovi klientojn!

Singarde ni jam rezervigis dormoĉambrojn en *Trinidad* ĉe gastigantoj konataj de amikoj de

*Amapola*. Fakte estas du familioj en du domoj, kiuj komuniĝas per intera korto. Eblas en- kaj for-iri ĉe unu aŭ la alia strato. Pro tio tiu familio havas kvar adresojn: ĉar en *Trinidad* domoj havas du adresojn kaj kvankam oni fiksas sur fasadoj de la stratoj ŝildojn kun novaj nomoj kaj numeroj, la homoj pli bone konas la antaŭajn stratnomojn, precipe ĉar la malnovaj ŝildoj restas bone videblaj. Eĉ mapo de *Google* montras ambaŭ nomojn de ĉiu strato! Ni ŝatis nian loĝejon aparte pro la surtegmenta teraso de kie ni povis admiri de supre la urbeton kaj la belan pejzaĝon de la montaro *Escambray*.

En *Trinidad* ni renkontis *Juan*, esperantiston, kongresanon, kies adreson donis al ni *Maria*, nia gvidistino dum la antaŭkongreso. Li proponis al ni manĝi kun alia loka esperantisto (komencanto) en kuba restoracio, t.e. restoracio kie oni pagas per *pesoj* (mono por kubanoj) kaj renkontas ĉefe kubanojn. Kun *Juan* kaj aliaj kubanoj foje ni libere parolis pri la lando, la ŝtato k.t.p. Ili volonte esprimis siajn opiniojn pri la politika kaj ekonomia situacio. La plimulto el ili esperas pliboniĝon de la ekonomia situacio, kredas ke ŝanĝoj alvenos sed prefere ne tro subitaj. Je la fino de la manĝo, *Juan* pagis la manĝaĵon per *pesoj* kaj ni pagis la trinkaĵojn per *C.U.C.* Estas alia karakterizaĵo de tiu lando. Ekzistas du monoj: unu, la *C.U.C.* por la eksterlandanoj, kaj la alia, la *peso* por la kubanoj. Unu *CUC* valoras ĉirkaŭ 25 *pesojn*. Dum ekzistas malmultekostaj produktoj vendataj kontraŭ *pesoj* por la kubanoj, ankaŭ ekzistas multaj maloftaj sed necesaj produktoj

(sapoj, kraĵonoj, vestoj, ŝuoj k.t.p.) vendataj nur kontraŭ *CUC*, do tre multekostaj por la kubanoj. Post la vespermanĝo, surprizo atendis nin. Pro la nacia festo de la Revolucio, ne plu laboris taksistoj post iu horo. Do kiam ni eliris el la restoracio, *Juan* diris al ni ke ni devas piede reiri al la urbo, je ĉirkaŭ 8 kilometroj for... kaj nokte post la 10-a ! Do kuraĝe ni kvin ekiris rehejmen kaj post kelkaj centoj da metroj, en la punkta senlumo, nin preterpasis ĉevalĉareto. Kaj la esperantista amiko rekonis la voĉon de amiko sia... kaj vokis lin kaj... ni jen sidiĝis sur la ĉareto... por reveni al *Trinidad*. Timante polickontrolon nia "ŝoforo" preferis adiaŭi nin antaŭ ol eniri en la urbon.

Ne estas sufiĉe da loko por rakonti ĉi tie pri aliaj aventuroj kaj vizitoj en *Trinidad*: preĝejoj, muzeoj instalitaj en la plej belaj koloniaj domegoj eĉ palacoj, vojaĝo per vaportrajno al sukera sklavista bieno kun alta gvatturo, aĉeto de fruktoj per *pesoj*, muzika kaj danca vesperoj, varmega renkonto de *Laurent* kun ĉarma kubana... meduzo en la Kariba Maro, tre rapida vizito al la plaĝo de *Trinidad*, gustumado de langusto en kaŝrestoracio k.t.p.

Jam finiĝis nia restado en *Trinidad*; poste ni veturis aŭtobuse al la urbo *Cienfuegos* por trovi *Maria*.

### **Cienfuegos, la "perlo de la sudo"**

En *Cienfuegos*, *Maria* proponis nin gastigi en sia familia apartamento kie vivas kvar generacioj: avino, patrino, fratino kun sia edzo kaj siaj du knaboj (*Miguel Angel* kiu partoprenis la infankongreson kaj *Leonardo* kiu estas unu-jara). Kompreneble ni estis ege kortuŝataj

de ilia afabla kaj simpla akcepto des pli ke *Luz* la avino, *Gladys* la patrino kaj *Miguel Angel* devis aliloke tranokti. Ni frandis la manĝojn kaj multe babilis hispane kun *Luz* kaj *Gladys* danke al *Amapola* kaj Esperante kun *Maria* kaj *Sonia*, ŝia fratino. Tie ni malkovris kiel oni vivas en neklimatizata domo kun fenestroj senvitraj ĉar en Kubo neniam malvarmas. Tiel ni aŭdis kaj partoprenis la noktan vivon de la stratoj.

En la domo de *Maria* estis tre malbanala rimedo por malfermi la enirejan pordon sen malsupreniri la ŝtuparon: de la pli alta etaĝo de la apartamento oni eltiras ŝnureton kiu laŭiras la manrelon de la ŝtuparo... Bela ekzemplo de kubana elturniĝemo.

Je la vespero post nia alveno *Maria* kondukis nin piede al geamikoj por renkonti aliajn esperantistojn de la urbo. Ni komencis babili kiam subite alvenis... *Graĵina*, litova esperantistino kiu vizitis nin en nia bretona urbo Sankta-Briego (france *Saint-Brieuc*, bretone *Sant-Brieg*) antaŭ kelkaj jaroj kaj instruis en la internaciaj renkontiĝoj en Pluezeko (france *Plouézec*, bretone *Ploueg-ar-Mor*). Ni ĝoje interŝanĝis niajn memoraĵojn kaj spertojn pri Kubo.

La sekvajn tagojn ni vizitis la urbon kaj la ĉirkaŭaĵon. La kubanoj nomas *Cienfuegos* "la perlo de la sudo" ĉar estas belega urbo kun haveno ĉe la Kariba Maro. La urbo estis kreita de francoj en la komenco de la 19-a jarcento. Pro tio la stilo de la arkitekturo ne estas sama kiel en Havano aŭ *Trinidad*: ĝi estas novklasika. Ni promenadis laŭlonge de puraj kaj vastaj avenuoj kaj admiris la belecon de la katedralo,





de la teatro kaj de la statuo de *Benny Moré*, la plej fama kantisto en Kubo.

Nokte ni vizitis la havenon dum junuloj estis fiŝkaptantaj kaj fine ni ĉeestis koncerton en trankvila etoso. Ni ankaŭ ŝategis ekskurson en la kamparon kaj mirindan botanikan ĝardenon. La lastan tagon ni vizitis la marbordan kvartalon kie riĉaj familioj konstruigis belajn domegojn antaŭ la Revolucio de 1959. Ni bone manĝis en restoracio de tiu kvartalo sufiĉe malproksima de la urbocentro. Do ni revenis per ĉevalveturilo ĉar ni devis rapidi pro la pasigita tempo antaŭ ol foriri el *Cienfuegos*. Subite la "ŝoforo" haltigis la ĉevalon pro polickontrolo. Post kelkaj minutoj ni komprenis ke bedaŭrinde li ne rajtis veturigi turistojn kaj devos pagi altan monpunon. Tamen, la policistoj konsentis ke li plu veturigu nin ĝis la aŭtobusstacidomo. Fine ni interkonsentis pri la pago de la monpuno kaj tiel la ĉevalgvidisto ne perdis sian dusemajnan enspezon.

### **Reveno al Havano trapasinte *Santa Clara***

Kiam ni alvenis en la urbo *Santa Clara*, ni decidis tuj aĉeti la biletojn de nia reveno al Havano antaŭvidita la morgaŭan tagon je la fino de la posttagmezo: kompreneble ni intencis viziti iomete la urbon de *Che Guevara*. Sed malbona surprizo atendis nin: ne plu eblis aĉeti biletojn ĉar la aŭtobuso jam estis tute rezervita... eĉ je la postmorgaŭo, ne certis ke restus biletoj... Ni renkontis esperantistojn

(*Christian kaj Martine*) kiuj estis en la sama situacio. Do kion fari? Ĉu enaŭtobusiĝi je la 4-a horo matene...? Ne, estus tro lacige. Ĉu provi preni noktan trajnon? Eble, sed ni sciis ke la vojaĝo trajne estas tre longa, do ankaŭ tre laciga. Kiu solvo? Do ni decidis tranokti en hotelo kaj serĉi kaj pripensi solvon. Feliĉe en la hotelo la deĵoranta oficisto diris al *Amapola* (kompreneble en la hispana lingvo) ke eblos trovi veturilon ĉe la stacidomo: ĉar ĉiumatene pluraj kondukistoj serĉas vojaĝontojn de *Santa Clara* al Havano por ne vojaĝi en malplena veturilo. Efektive la morgaŭan matenon ni facile trovis veturilon por iri al Havano kaj la prezo estis la sama kiel aŭtobuse. Konsekvence ni ne multe vidis la urbon...

Dum la du lastaj tagoj en Havano, antaŭ enaviadiliĝo al Francio, okazis lastaj vizitoj kaj aĉetoj de memoraĵoj.

Finfine je la 31-a de julio, kiam ni alvenis en la flughaveno, ni ĝoje revidis aliajn korusanojn kiuj same kiel ni daŭrigis sian restadon en Kubo. Ni plezure revidis ankaŭ kelkajn kubajn esperantistojn interalie *Miguel* kiun ni projektas akcepti en Bretonio en 2012...

Fakte ni nur komencis malkovri tre agrablan popolon kaj interesan landon. Certe ili ambaŭ indas pli longan restadon. Ni jam nun pripensas novan vojaĝon al tiu insulo.

Amapola Triguero kaj Laurent Peuch (Saint-Brieuc/Sant-Brieg - Bretonio)

**FOTO: statuo de Benny Moré en Cienfuegos**

En Dresdeno paradas  
 facetitaj monumentoj  
 Semper-operejo  
 Virino-preĝejo.  
 Boardas gapuloj  
 de la Alaŭn-parko  
 ĝis la Praga strato  
 pasumas al la sinagogo  
 kie koŝmar-voritoj  
 cedis lokon al farsuloj.  
 En ombroj de grupoj  
 boa-longaj tramoj  
 direktas al muzeo  
 kie ĉokolado-servistino  
 ridetas imagige.  
 Muze-butike  
 miras al fotoj  
 pri fulgaj ruino-puntoj  
 revemaj turistoj  
 kun okuloj de somnambuloj.

Benoît Philippe (Dresden - Saksio)

*Tria premio pri poezio en  
 la Internacia Literatura Konkurso EKRA – 2010 (Bulgario)*



Dum la Jarfino kune festis kaj festenis ĉirkaŭ 20 esperantistoj kun la kastela fantomo. Ili bonvenigos vin en la sekvaj aranĝoj organizataj en la kastelo:

- 2011-aprilo-16 / 23 FRINGOJ, festa renkonto por infanoj kaj junuloj
- 2011-apr-30 / maj-08 Staĝo gvidata de Stefan MacGill, sekvata de ILEI-ekzameno
- 2011-julio-16 / 23 Seminario kun prelegoj kaj diskutoj. Intensiva E-kurso
- 2011-julio-23 / 30 Alternativa semajno (ekologio, vegetarismo, verda turismo, naturismo, toleremo...). E-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj.
- 2011-jul-30 / aŭg-07 Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskurso al Luar-kasteloj posttagmeze. Kultura vesperoj.
- 2011-aŭgusto-08 / 15 Junulara renkonto FESTO de JEFO kun muzika festivalo
- 2011-aŭgusto-16 / 23 Festa semajno por infanoj kaj junuloj kun artaj aktivaĵoj kaj E-kurso (post-FESTO)

Vidu nian agendon en <http://gresillon.org>

## Mia unua amo

Estis en la naŭa klaso aŭtune, dum lernpaŭzo, kiu ĉiam kunigis ĉiujn gimnazianojn sur la Karl-Marx-placo (1), kiam iu de malantaŭe ŝovis al mi en la manon malgrandan letereton. La „leterportinto“ tuj malaperis en la homamaso. Kune kun *Rosi*, iu pli maljuna samklasanino, kiu jam laboris en la Okcidento kaj nun refoje frekventis la lernejon, mi rapidis lerneĵ-necesejon kaj legis: „Kara Petra! Se vi volas iĝi mia amikino, bonvolu informi min. L.P.“

Tio estis ja lakona amletereto! Tamen mi estis ekscitita. Pri kiu povus temi? Kiun mi „informu“? Mi ja ne povis kaj ne volis demandi tra ĉiuj klasoj!

Apenaŭ la lernohoro finiĝis, kelkaj lernantoj ekvokis kun moka rideto tra la klaso: „Petra, oni petas ke vi eliru!“ Tie nun staris la leterinto: granda, forta, bone ĉarpentita, kun nigra hararo kaj flora akneo en infaneca vizaĝo. Li jam estis en la deka klaso. Mi ankoraŭ neniam vidis lin en la lernejo. Li plaĉis al mi, eĉ se mi estis iom frapita de la serioza, preskaŭ trista fizionomio. Mi konsentis posttagmeze spekti kun li en kinejo la italan filmon „Patroj kaj filoj“.

De la filmo mi ne vidis multon, ĉar pro koketeco mi lasis miajn okulvitrojn hejme. Timidaj kaj sinretenemaj ni poste promenis unu apud la alia supren laŭ la Berlina strato kaj returne malsupren laŭ la Jakoba. Mi eksciis, ke lia patrino estis vidvino kaj ke li ankoraŭ havis pli aĝan fraton.

Ĉe tiu nia unua promeno „oni rimarkis nin“. Sinjorino *Becker* perfidis tion al miaj gepatroj, kiuj tamen neniel zorgis pri tio. Kaj mi gardis min konfidi detalojn al ŝi.

La tutan tempon, kiun daŭris niaj komunaj promenoj, ni malmulte interparolis. La neembarasiteco, kiun mi kutimis en miaj infanaj amikecoj, mankis inter ni. Mi ne sciis, kial tiu knabo nun enamiĝis ĝuste al mi. Tre alloga mi min ne trovis – kun miaj du pitaj talpo-konusoj. Tiuj restis ankoraŭ sufiĉe longan tempon kaŭzo de diversaj kompleksoj de malplivaloreco.

Se tio, kio jen ŝpiniĝis inter ni ambaŭ, estis amo, ĉi-kaze ĝi ne manifestiĝis je vortoj aŭ gestoj. Ni estis sufiĉe okupataj je komenca interkonatiĝado kaj lasis al ni tempon: kio ja ne mankis al ni – almenaŭ laŭ nia supozo. Sur niaj lipoj flugis nur bagateloj.

Vintre okazis lerneja balo en la Pafista Domo. *Lothar* venis al mia hejmo por preni min – ni ankoraŭ loĝis ĉe la *Hartmann*-strato. En la laŭta kaj vigla dancejo ni sidis unu ĉe la alia kun glaso da ruĝa vino antaŭ ni. La por ni nekutima alkoholaĵo kaŭzis, ke ni ĉiam denove dancis strete ĉirkaŭbrakitaj konstante la samon: je unu longa paŝo, je du mallongaj. Tio ja nomiĝis fokstroto. Ion alian ni ne konis, ĉar ni ne prenis dancinstruon. Unu el liaj samklasanoj alkriis lin: „Nu, *Panne*, vi tute ne timidas!“ (Lia familia nomo estis „*Pannitschka*“.)

Mia amiko aspektis eleganta en sia kostumo kaj ŝvitis kiel eble plej abunde. Ankaŭ dum ĉi turbula vespero, kiun ni pasigis tiom intime proksimaj, ni ne multe parolis. Tamen sparko transsaltis sur min. Kiam noktomeze mia amiko hejmen akompanis min traneĝe, li je la unua fojo metis sian brakon ĉirkaŭ min. Antaŭ mia dompordo mi ricevis la unuan kison – kaj,



**BILDO: memportreto de Petra (1959)**

rapide adiaŭinte lin, ekkuris en la loĝejon al la akvokrano por tralavi al mi la buŝon. Mi estis terurita. Mia voluptivo ankoraŭ ne vekigis, kaj la

fremda lango sur la mia ŝajnis al mi ja tro stranga. Mia inklino estis ankoraŭ tute afero de koro. Ni ja ne plu estis infanoj, sed nia kviet

temperamento ne instigis nin kolekti sperton, kiu ne venis el la propra fonto de nia inklino. Al ni sufiĉis la ĉeesto de la alia, al ni sufiĉis kuna promenado kaj sentado de io simila al enamiĝinteco. Kelkfoje, sekrete, kiam neniŭ paŝis surstrate, ni tenis nin reciproke je la manoj. Elmontrado de sentoj tiutempe ne decis.

Ni ne demandis, kial ni nin amis, ne pripensis niajn sentojn. Mi serĉas vortojn por tio: varmkoreco, reciproka respekto, timideco, retenata ĝojo.

Tiam venis la someraj ferioj, kiuj devigis min en la malsanulejon en *Rothenburg* (2) por operacio ĉe kalkano. Poste hejme sekvis dolorplenaj semajnoj, mi povis nur pene piediri. Kiam lernoĵaro denove komenciĝis, mi vane serĉis mian amikon, tamen neniun demandis. Apenaŭa, ronĝa doloro en la koro daŭremis. Disreviĝo kaj senkomprenemo ne lasis min trankviliĝi. Kie estis *Lothar*? Ĉu li malsanis? Kial li kaŝiĝis antaŭ mi? Iele mi provis ignori tion, parolis kun neniŭ prie.

Dum la aŭtunaj ferioj ni devis labori. Oni dividis nin en grupojn por pesi kaj disdoni enkeligitajn terpomojn. Tio estis ĉiujare granda agado. Rekte de la kampoj venis la kamionoj kaj ŝutis la terpomojn antaŭ la nutraĵovendejo Konsum simple sur la straton, kie ili estis ŝovelataj en alportitajn sakojn por funto-cento, transportataj manĉarete de familioj hejmen por enkeliĝo. Dum la laboro du lerneĵanoj de la dekunua klaso kondukis min flanken: "Saluton de *Lothar*! Kun sia patrino kaj la frato li eliris en la Okcidenton kaj ne rajtis

ion diri al vi. Jen lia adreso, vian li ne plu havas. Skribu al li!"

Stono defalis de mia brusto sed samtempe falis ankaŭ alia ŝtono sur ĝin. Tio do estis la kaŭzo! Mi ekkomprenis, ke li estis devinta silenti pri la fuĝo.

Dum pluraj jaroj leteroj vojaĝis tien-reen inter *Tübingen* kaj *Görlitz*, pli malfrue *Dresden*. Montriĝis, ke skriba lingvo estis nia plej taŭga komunikilo. Nur nun ekis vera interŝanĝo de ideoj. Aplomba, mense vigla *Lothar* rakontis ilustre kaj humurplene pri sia lerneja ĉiutagaĵo, pri vojaĝo al Anglio, pri – kiel ŝajnis al mi – senlima libereco de la Okcidento. Iam ni ne plu skribis unu al la alia. Ne transirebla limo kuŝis inter mia amiko kaj mi, kaj "dividita ĉielo" (3) super ni.

Tiele mi spertis mian unuan amon kiel ion kvietan, sekretan, serenan. Ĉio restis malferma, restis milda intertuŝo kaj ekspekto.

(1) nuntempe: *Wilhelm*-placo

(2) urbeto 25 km norde de Gorlico

(3) „dividita ĉielo“ aludas la germanan romanon "*Der geteilte Himmel*" (1962) (= La dividita ĉielo) de *Christa Wolf* (1929), kie la du protagonistoj *Rita* kaj *Manfred* estas disduigitaj per la sama netrasmirebla limo inter orienta kaj okcidenta Germanioj.

**Petra Hesse** (Dresden – Saksio)

*Petra Hesse* naskiĝis en 1943 en la nun pola parto de Gorlico, *Zgorzelec*. Kun siaj gepatroj ŝi estis forpelita trans la riveron Niso en 1945. Ĝis 1961 ŝi vivis en la okcidenta, plu germana parto de Gorlico, *Görlitz*. En sia libro „*Sonate in G*“ (= Sonato en sol) aperinta en 2010 ŝi rakontas pri siaj infanaj jaroj kaj frua junaĝo

en sia hejmurbo en Supra Luzacio kaj en la malgranda feriloko *Geising* en la orienta Ercmontaro.

El la germana lingvo esperantigis Benoît Philippe (Dresden – Saksio)

## Vizitu

[www.esperanto.bretonio.free.fr](http://www.esperanto.bretonio.free.fr)

[www.esperanto-dresden.de](http://www.esperanto-dresden.de)

[www.vroclavo.republika.pl](http://www.vroclavo.republika.pl)

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

[www.lernu.net](http://www.lernu.net)

[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

[www.podkastaro.org](http://www.podkastaro.org)

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

[www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org)

[www.esperanto.de](http://www.esperanto.de)

[www.edukado.net](http://www.edukado.net)

[www.esperanto.koszalin.pl](http://www.esperanto.koszalin.pl)

[www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)

[www.eventeo.net](http://www.eventeo.net)

[www.uea.org](http://www.uea.org)

[www.esperanto-panorama.net](http://www.esperanto-panorama.net)

[www.esperantoland.de](http://www.esperantoland.de)

## Legu

Se vi interesiĝas pri la Antikva Oriento: *Michael Wolf* en *Neustadt* en Saksio tradukis du librojn pri ĉi tiu temo en Esperanton. Ili estas legeblaj je jenaj interretaj adresoj:

[www.sorbzilla.de/aorient/akada.pdf](http://www.sorbzilla.de/aorient/akada.pdf) "Enkonduko en la akadan" de *Richard Caplice* (el la angla)

[www.sorbzilla.de/aorient/aorient.pdf](http://www.sorbzilla.de/aorient/aorient.pdf) "Enkonduko en la Antikvan Orienton" de *Wolfram von Soden* (el la germana)

## Mi dankas Vin Sinjoro

Por la bato en la vivon, kiu krevis  
je etajn pecetojn kaj ekhurlis ŝakaloj  
fine de ĉiu vojo.

Por l' tim' infana,  
kiam hakita kapo de mia av' Ignaco  
falis ĉe miaj piedoj.

Por la dolor' de l' pens', dronanta  
inter deliroj.

Por la vaku', kiam imago  
eliĝadis el okulprofund'.

Por neniec',  
lulil' de noktaj timoj.

Por spiritnokto kaj sufer'  
kiujn mi ne komprenis.

Por la rikana rid' de vendemaj  
kaj perfidaj amikoj.

Por la jardudeko da silent'.

Herbej', sur kiu paŝtas sin  
miaj versoj kaj trinkas el fontoj  
de pura mort'.

Dezerto multoŝpura,  
silento en mond-bruo.

Kaj dankon pro tio Sinjoro,  
ke mi ne perceptas Vin,  
maŝo  
pendanta  
super mia  
kapo,  
ringo  
vivosava.

Stanisław Srokowski (1936)

El la pola lingvo esperantigis Andrzej Kraszewski (Wrocław – Silezio)  
Originala titolo: *Dziękuję Ci Panie*

Stanisław Srokowski estas konata ĉefe kiel prozisto. Liaj romanoj atingis grandan sukceson. "Timo" konkeris la junaĝan legantaron. La romano "Amo kaj frenezo" akiris la premion de *Piętka*. "Rehejmuloj" fariĝis bonvendaĵo kaj pintromano de la jaro. Kaj la kolekto de randlimaj rakontoj "Malamo" estis distingita per la premio de *Mackiewicz*. En 2005 aperis eta kolekto de poeziaĵoj "Amo kaj morto". La ĉi-supra tradukaĵo aperis en la dulingva (pola - Esperanta) libro "*Liryki – Liriko*" (en 2009 en Vroclavo), kiu prezentas kelke da konataj kaj nekonataj strofoj el "Amo kaj morto".